nia voĉo

madrida esperanto-liceo aprilo 2022


## PUBLIKAJ AKTIVAĴOJ EN APRILO

Fine de aprilo ni havos la okazon montri Esperanton en la publika sfero.

La 22an de aprilo okazos denove la Nokto de la Libroj, kunvokata de la madrida regiona registaro. MEL partoprenos en ĝi, laŭ invito de la organizantoj, per la prezentado de la libro *"Lengua y utopía, el movimiento esperantista en España 1890-1936"*, fare de ĝia aŭtoro mem, Roberto Garvía Soto, profesoro de Sociologio de la Universitato Carlos III. Ĝi okazos en la sidejo en la strato Rodríguez San Pedro, 13, je la 18,00 horo. La prezento okazos en la hispana lingvo, do bv. inviti amikojn kaj simpatiantojn, kiuj povas esti interesitaj pri la historio kaj karaktero de la Esperanto-movado.

En tiuj tagoj, Esperanto denove partoprenos en la sinsekva legado de la verko Don Quijote, organizata de la Círculo de Bellas Artes. Nia vico estas antaŭvidata por la 21a de aprilo, je la 21,15 horoj, en ties sidejo. Samideanoj dezirantaj partopreni en la legado aŭ nur akompani nin, kontaktu kun Liceo, aŭ atendu nin ĉ. la 21 horo en la halo de la kulturinstitucio.

## POEZIO POR LA PACO




La pasintan 5an de marto okazis en Madrido 12-hora poezia maratono fare de la engaĝiĝintaj poet-grupoj "Poezio pri la kritika konscio", "Voĉoj el la ekstremo", "Strikfonduso" kaj aliaj por protesti pri la invado de Ukrainio fare de Rusio. Ĉi-kuntekste nia samideano Miguel Fernández estis invitita partopreni kiel Esperanta voĉo kadre de la "poezio pri la kritika konscio" kaj li plej volonte akceptis.

Li havis la okazon deklami siajn poemojn en la hispana kaj, laŭ peto de la organizantoj, ankaŭ en Esperanto. Tio do elstarigis la "internan ideon" de Esperanto kaj signifis vere mirindan agnoskon de la esperanta poezio.

## VIZITIS NIN

La merkredon 23an kelkaj esperantistoj renkontiĝis, profitante la alvenon de samideano el Francio, Arlette Frangeul, kiu turismis kun grupo de samlandanoj. Ni kunmanĝis kaj montris al ŝi diversajn lokojn en la centro de la ĉefurbo. En la renkonto partoprenis ankaŭ Francisco Javier Moleón, madrida samideano kutime loĝanta en Bruselo, sed kiu ankaŭ troviĝis en la ĉefurbo, kaj novulo, Ángel, kiu konis la rendevuon pere de Twitter kaj unuafoje praktikis la lingvon ekster la reto.



Ni esperas ke la plibonigo de la sankondiĉoj denove ebligos la viziton de aliaj samideanoj. Atentu la kunvokojn pere de retlistoj kaj sociaj retoj!

## ĜENERALA KUNVENO DE MEL

Laŭ la kunvoko sendita en pasinta numero, la 7an de marto okazis ĝenerala kunveno de Madrida Esperanto-Liceo, kun partopreno miksa, ĉeesta kaj reta.

Laŭ la tagordo, oni aprobis la raportojn, kontojn, agadprogramojn kaj buĝeton.

La kunveno renovigis la estraron. Fakte, la konsisto montris kontinuecon, kun la escepto de la ŝanĝo de kasisto, kiu de nun estos Matilde Montero. MEL dankas la antaŭan kasiston, Jaime Vinielles, pro lia sindediĉo.

Kiel kelkaj el vi spertis, dum iom da tempo okazis problemoj pri la pago de kotizoj al la konto de MEL, kiu daŭris eĉ ĝis la komenco de marto. Ŝajnas ke finfine ili jam estis solvitaj. Vi do povas pagi vian kotizon, aŭ vi povas monapogi la asocion pere de la konto en la banko ARQUIA BANCA, kun numero: ES55 3183 2800 1310 0655 7423.

Ni ankoraŭfoje memorigas ke se vi ne estas ano, vi povas aliĝi al Madrida Esperanto-Liceo plenigante la aliĝilon kiu troviĝas en la fako "Dokumentoj" de la retejo de MEL: http://esperanto.es/mel/. Laŭ decido en la Ĝenerala Kunveno la kotizo restas 12 eŭroj jare.

## PROGRAMO DE LA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

Kiel jam anoncite, inter la 29a de aprilo kaj la 3a de majo 2022 okazos en la urbo Comillas (Kantabrio) la 80a Hispana Kongreso. La organizantoj jam publikigis la programon, kiun oni povas legi en: https://www.esperanto.es/hef/index.php/80a-kongreso/programo.

La aliĝilo troviĝas en la adreso http://www.esperanto.es/kantea/eo/aligilo/. Aliajn informojn, inklude de alveneblecoj kaj loĝado, vi povas legi en la retejo http://esperanto.es/kongreso/.

## MADRIDAJ KUNVENOJ



Ni daŭrigas la unuasabatajn rendevuojn en la strato Esperanto de Madrido. Vidu apude foton de la marta rendevuo, por ke vi povu konstati la amikan etoson.

Por aprilo, ni denove kunvenos la unuan sabaton, la 2an, ankaŭ je la 18,30 horo en la sama loko, la polpejo Pulpería O Miño, ĉe la numero 2 (metrostacio Alsacia, lineo 2). Memoru ke ĉiuj estas bonvenaj, sendepende de la nivelo de la lingvokono, kaj ke la babilado estas tute libera.

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, sed sen aparta programo.

## POR PLIAJ INFORMOJ

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

~~Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo~~

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com